FREŜA VENTO № 1.
LATVIO BET ★ 57 Sabato, la 15-a de julio

Estimataj partoprenantoj de la 57aj Baltiaj Esperanto-Tagoj!

Bonvenon al Ventspils, kiu ĉijare estas gastiganto de Baltiaj Esperanto-Tagoj!

Tiu-ĉi bela, prospera urbo havas la honoron jam la 2-an fojon por semajno iĝi la ĉefurbo de Esperanto en Baltio – en 2008 la 44-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj ankaŭ okazis en Ventspils.

Mi havas duoblan ĝojon bonvenigi vin hodiaŭ, ĉar ni ĉiuj longe atendis ĉi eventon – lasta BET en Latvio okazis antaŭ longaj ses jaroj – en 2017. Covid 19 pandemio, limigoj, malpermesoj, prokrasto, nuligo – feliĉe tio estas jam historio.

Organiza komitato de BET-57 preparis por vi interesan programon – lingvokursojn, prelegojn de Somera Universitato, ekskursojn, riĉan vesperan programon, okazos seminario por aktivuloj, kvizo, aŭkcio k.a., tamen trovu tempon ĝui la urbon, sunon, venton kaj maron.

Ventspils elstaras kun aparta bonvolemo al turistoj, ordigiteco kaj la statuso kvazaŭ aparta respubliko, ĉar eĉ la Novan Jaron oni ĉi tie renkontas aparte, laŭ sia propra tempo – je la 00.33.

En Ventspils ĉiu povas trovi ion por si interesan kaj instigan. Iuj vizitos muzeon en kastelo de la Livonia ordeno kun moderna ekspozicio, iuj promenos en Ĉemara liberaera muzeo kun unika kolekto de ankroj kaj funkcianta etŝpura fervojo, iuj vizitos la plej novan konstruaĵon en la urbo, kie situas la Scienca centro VIZIUM. Nepre iru ĝis la maro por vidi mirindan orsablan strandon, veturu ĝis la mara pordego per la ŝipeto „Duko Jakobo”. Kaj eĉ se vi simple promenados laŭ puraj kaj prizorgitaj stratoj de la urbo, tenu la okulojn vaste malfermaj por ne preterlasi multnombrajn skulptaĵojn, fontanojn kaj precipe florajn ornamaĵojn, ĉar ja ne vane oni nomas Ventspils ĉefurbo de floroj kaj fontanoj. Haltu por kontroli tempon ĉe la Flora horloĝo, observu ĉielarkon ĉe la fontano „La sunaj boatetoj” kaj nepre fotiĝu ĉe iu el multkoloraj bovinoj – la neoficiala simbolo de Ventspils.

Mi deziras al Vi agrablan laboran kaj distran semajnon!

Margarita Želve
prezidantino de la Organiza Komitato de BET-57

BONVENON AL VENTSPILS!

BET-57 – salutmesaĝo de la Prezidanto de EEU

Kiel Prezidanto de EEU estas mia granda plezuro sendi varmajn salutojn kaj gratulojn al BET. La baltaj landoj havas riĉegan Esperanto-tradicion kaj mi tre ĝojas ke via eminenta agado daŭras jaron post jaro.

Pasintjare mi substrekis kiel la propono de EEU pri la Multlingva Akcelilo, la uzo de Esperanto por rapidigi kaj plibonigi lingvolernadon ĝenerale, fariĝis la plej populara propono en la eduka areo dum la Konferenco pri la Estonto de Eŭropo. Malgraŭ tiu popularеco la EEU-propono ne estis menciita en la konkluda dokumento de la Konferenco, sed feliĉe D-ro Michele Gazzola kaj aliaj spertulaj kolegoj altiras atenton denove al ĝi septembre 2022 en altkvalita raporto kiun mendis la Kultura Komitato de la Eŭropa Parlamento.

Oni diras ke guto da oficiala agnosko fare de ŝtato egalas al tuno de unuopula civitana agado. Pro tio, la strategia celo de EEU nuntempe estas, ke pli kaj pli multaj EU-landoj oficiale agnosku Esperanton kiel portanton de kulturo, kaj nacia kaj eŭropa kulturo. Pollando oficiale agnoskis Esperanton en 2014, kaj Kroatio faris tion en 2019. EEU petas, ke la baltaj landoj faru similan klopodon por akiri oficialan agnoskon de Esperanto je nacia nivelo, en Litovio, Latvio aŭ Estonio.

Samideane via.
D-ro Seán Ó Riain
Prezidanto de EEU

La PROGRAMO de la 57-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj:

SABATO, 15.07

10.00 – 22.00	Alveno, registrado	Studenta hotelo (Promensalono)
15.00 – 17.00	Ekskurso tra Ventspils	Kolektiĝo ĉe BET-ejo
19.00 – 20.30	Interkona Vespero	BET-ejo (Salono)

DIMANĈO, 16.07.

10.00 – 11.00	Alveno, registrado	BET-ejo (Promensalono)
11.00 – 12.00	Solena Malfermo de BET-57	BET-ejo (Salono)
12.00 – 12.40	Koncerto de ensembloj ““Ventiņ” kaj “Kāndla”	BET-ejo (Salono)
12.40 – 13.00	Komuna fotado	antaŭ BET-ejo
15.00 –16.00	Granda kvizo pri Eŭropo	BET-ejo
19.00 – 20.30	Amuza vespero kun ensemblo “Sītava”	BET-ejo (Salono)

Estimataj BETanoj! Reehu! Kunlaboru! Verku! Ni atendas viajn artikolojn, poezion ktp.

La numeron preparis: Organiza komitato de BET-57, kompilis, Genovefa Tamane